



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

Abonu al

Pilo-Press!

Jara abonkotizo

30,- DM

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 37/76 - 15 sep 1976  
Aperas ĉiusemajne

### Rejkjaviko invitas

Rotterdam (pp) - Ĵus aperis la 1-a Oficiala Komunikado de UEA pri la 62-a Universala Kongreso de Esperanto 1977 en Rejkjaviko, Islando. El ĝi ni citas:

#### Sub ŝtatestra protekto

La titolon de Alta Protektanto de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto akceptis la prezidanto de la respubliko Islando, d-ro Kristján Eldjárn.

#### Ĉefministro en honora komitato

La ĉefministro de Islando estas unu el ok elstaraj personecoj de la islanda publika vivo, kiuj jam aniĝis en la Honora Komitato de la 62-a UK. La ĝismuna listo konsistas el D-ro Sigurbjörn, episkopo de Islando; s-ro Geir Hallgrímsson, ĉefministro; s-ro Vilhjálmur Hjálmarsson, ministro pri kulturo; d-ro Gylfi Th. Gíslason, eksministro pri kulturo; s-ro Magnús Torfi Ólafsson, eksministro pri kulturo; s-ro Sveinn Einarsson, direktoro de la Nacia Teatro; f-ino Vigdís Finnbogadóttir, direktoro de la Urba Teatro; s-ino Sigrídur Thorlacius, prezidanto de la Virina Sindikato.

#### Kiel atingi Islandon?

Ekzistas, kompreneble, du manieroj por atingi la kongreslandon: per ŝipo, kaj per aviadilo. Kvankam iuj ŝiplinioj pasaĝeraj ankoraŭ funkcias (ekzemple aŭtopramŝipo ekde la nordo de Skotlando), preskaŭ la tuta trafiko estas nuntempe aera. Regulaj rektaj fluglinioj ligas la islandan ĉefurbon kun Ĉikago, Duseldorfo, Feroaj Insuloj, Frankfurto, Glasgovo, Gronlando, Kopenhago, Londono, Luksemburgo, Nov-Jorko, Oslo kaj Stokholmo. Por fari la vojaĝon kiel eble plej facila kaj ekonomia, oni jam planas plurajn specialajn karavanojn. Por skandinaviaj, ekzemple, la multjara karavangvidanto s-ro Gusta Köhlmann, (Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj) proponas vojaĝon ekde Kopenhago kaj reen, kiu kostas entute 1955 danajn kronojn, inkluzive de hotelo. (La normala prezo sen hotelo estas 2760 kronoj.) Detalaj informoj haveblas ĉe la indikita adreso. UEA mem preparas ĉartoflugojn por po 100 - 200 personoj el Parizo kaj Amsterdamo. La prezo sen hotelo por la flugo Amstĉdam-Rejkjaviko kaj reen estas antaŭvideble ĉ. 600 guldenoj. Karavanoj ankaŭ el aliaj landoj estas konsiderataj. Ĉiuj legantoj, kiuj interesiĝas pri eventuala partopreno en ĉartoflugo de Amsterdamo aŭ de Parizo estas petataj provizore sin anonci - tute sen ia sindevigo - per poŝtkarto al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

#### Kiom kostas la loĝado?

La hotelaj prezoj en Rejkjaviko - laŭ la nun valida tarifo - varias de ĉ. 90 gld. ĝis ĉ. 40 gld. por ĉiu persono kaj nokto, inkluzive de la matermanĝo, kompreneble depende de la kategorio. Ekzistas ankaŭ ebleco, ke LKK sukcesos aranĝi ankaŭ ian tre simplan amasloĝadon en lernejo.

#### Jam pli ol 300 aliĝoj

Ĝis la 12-a de septembro estis registritaj jam 340 aliĝoj el 38 landoj.

## Intervjuo kun Rudi Graetz

Ateno (pp) En Ateno la komitato de Universala Esperanto-Asocio akceptis i.a. la aliĝpeton de Centra Laborrondo Esperanto de Germana Demokratia Respubliko. Per tio la Centra Laborrondo fariĝis egalrajta membro kiel landa asocio de UEA.

En intervjuo, kiun faris la Esperanto-redakcio de Pola Radio en Ateno, la prezidanto de la Centra Laborrondo Esperanto de GDR, Rudi Graetz, komentis la akcepton de la aliĝpeto jene:

"Ni kompreneble ĝojas, ke la granda plimulto de la komitato de UEA akceptis nian aliĝpeton. Tio signifas, ke ni estonte samrajte kunlaboros en UEA. Tio certe havos pozitivajn sekvojn ankaŭ por la Esperanto-movado en Germana Demokratia Respubliko.

Antaŭ 12 jaroj ni komencis nian laboron kaj ni opinias, ke certe ni donis ion al la internacia Esperanto-movado kaj ankaŭ al UEA. Mi povas doni ekzemplon al vi kaj diri, ke ni ankaŭ kontribuas sur la literatura kampo. Antaŭ du jaroj ni eldonis la libron de Bruno Apitz "Nuda inter lupoj" kaj nun estas en preparo la trigroŝa romano de Bertold Brecht. Kaj ni esperas, ke ankaŭ tiu ĉi romano havos internacian sukceson kiel la libro de Bruno Apitz. Ni ankaŭ sinkronigis filmojn en Esperanto, kaj ni montris tiujn filmojn en diversaj landoj, kongresoj, seminarioj kaj aliaj okazaĵoj. Ni ankaŭ eldonas gazetojn, inter ili la "GDR-Paĉon", en kiu ni kontribuas literaturaĵojn kaj fakajn artikolojn. Tiamaniere, mi pensas, fakte ni iom aldonis al la internacia Esperanto-movado, jam antaŭ la akcepto en UEA."

Aldone al tiuj komentoj diris d-ro Detlev Blanke, sekretario de la Centra Laborrondo Esperanto de GDR, ke la esperantistoj en GDR havas bonajn rilatojn al esperantistoj en najbaraj ŝtatoj, li elstarigis la amikec-kontrakton kun Pola Esperanto-Asocio.

Por la trigroŝa romano de Brecht, kiu aperos venontjare, d-ro Humphrey Tonkin skribis enkondukon, konstatas d-ro Blanke kaj aldonis, ke la Centra Laborrondo speciale povos subteni la ekstereŭropan agadon de UEA, en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Pri la aliĝo de la Laborrondo Esperanto de GDR al UEA raportis la pola partia gazeto "Trybuna Ludu" kadre de raporto pri la Universala Kongreso de Esperanto en Ateno.

## Aŭtoro de la jaro 1975

Novara (pp) - La literatura rondo "La Patrolo" proklamis s-ron Albert Goodheir, skoto, aŭtoro de la jaro 1975. En la konkurso partoprenis Aldo Giorgi, Edwin de Kock, Albert Goodheir, H. Paruzel, Karolo Piĉ kaj eksterkonkurse Nicolino Rossi.

La elekton pravigis la internacia juĝantaro, konsistanta el Roger Bernard, Clelia Conterno Guglielminetti, Ad Fighiera-Sikorska, D.B. Gregor kaj Emilija Lapenna, per jena deklaro:

"Lia agado dum la 1975-a estis tre ampleksa: originala poemaro "Merlo sur Menliro", abunde recenzita en la gazetaro; traduko de "Bakĥantinoj" de Eŭripido; traduko (nun presata de romano de Stevenson); aperigo de intensiva korespondkurso; prezidado de kongreso; paroladoj; redaktorado. Lia verko aperas pli-malpli regule en "Brita Esperantisto" kaj "Esperanto en Skotlando"."

La prezidado okazos dum la aparta kunveno enkadre de la landa kongreso itala en Massa de la 18-a ĝis la 24-a de septembro ĉijara.

Sekretario de la literatura rondo "La Patrolo" estas Carlo Minnaja. Aĉeso de la rondo: S-ino Michela Lipari, teknika sekretariino, v.le Volta, 85/e, I-28100 Novara.

### Esperanto kaj politikaj partioj

Offenbach (pp) - La 3-an de oktobro 1976 oni elektos en FR Germanio novan federacian parlamenton. La antaŭ-balota tempo estas bona okazo, ankaŭ por esperantistoj, kontakti la politikajn partiojn por ekscii ilian sintenon al Esperanto.

Kiel ni jam informis, "Esperanto Informo Offenbach r.a.", kiel nomigas la esperantistoj en Offenbach, invitis la politikajn partiojn de tiu urbo, kiuj kandidatiĝas por la balotoj, al diskutkunveno: SPD (socialdemokratoj), CDU (kristandemokratoj), FDP (liberaldemokratoj), DKP (komunistoj), KPD (ekstremaj komunistoj). CDU rifuzis veni al la kunveno pro la ĉeesto de komunistoj. Tamen reprezentanto de CDU promesis veni al iu klubvespero de la esperantistoj.

Ĝenerale oni rekonis la eblecojn de Esperanto por solvi lingvajn problemojn. Reprezentanto de FDP eĉ faris praktikajn proponojn por akceli Esperanton. La reprezentanto de SPD, Heinrich Zeller, kiu mem estas lingvoinstruisto, pozitive prijuĝis Esperanton, sed li devis konfesi, ke lia partio ne jam havas fiksitajn starpunktojn rilate al Esperanto. Li eĉ skribis antaŭ la kunveno al la ĉefa estraro de SPD en Bonn, por ekscii la sintenon de la plej alta gremio de SPD. Li akceptis la proponon de la esperantistoj de Offenbach resti kun ili en kontakto, speciale ĉar li estas membro en la komisiono pri la "kadraj direktivoj" en Heslando kaj ege interesiĝas pri la kontribuoj de la esperantistoj. La reprezentanto de DKP ne povis fari iujn eldirojn de sia partio pri Esperanto, sed li diris, ke li scias pri bona stato de Esperanto en socialismaj landoj. La reprezentanto de KPD entute ne parolis pri Esperanto, sed faris propagandon pro sia partio.

Sendube, estis interesa arango, pri kiu la loka gazeto detale raportis, sed ĉu restos efikoj favore al Esperanto post la balotoj, tio estas duba: Antaŭ balotoj politikistoj multon promesas. Tamen la arango kontribuis al la plialtigo de la prestiĝo de Esperanto en Offenbach. Aliflanke ni esperantistoj konsciu, ke de partioj ni ne povas atendi esencan kontribuon por antaŭenigo de Esperanto. Ĉu tiu situacio ŝanĝiĝos, kiam temos pri la balotoj por la Eŭropa Parlamento en la jaro 1978, dependos ĉefe de la esperantistoj.

### Internacia Somera Universitato 1977

Roubaix (pp) - Kadre de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Rejkjaviko, Islando, inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 1977, estas programita la Internacia Somera Universitato. Universitataj profesoroj kaj kvalifikitaj personoj estas invitatataj proponi sin por prelegi. Ili sendu resumon de la proponata prelego, foton, biografion kun siaj titoloj kaj oficoj al la adreso de la komisiono pri ISU: 2 bd. de Douai, F-59100 Roubaix, antaŭ la 15-a de januaro 1977.

### Grand Dictionnaire Esperanto-Français

Paris (pp) - Aperis "Grand Dictionnaire Esperanto-Français de G. Waringhien. Temas pri reeldono sub la ŝildo de SAT-Amikaro, poresperanta organizo por franclingvaj landoj, - sed kun suplemento. Tiu eldonaĵo estas aparte bona, ĉar jam de pluraj jaroj tute mankis ampleksa vortaro Esperanta-franca.

### Esperanto-kunveno kun televido

Mannheim (pp) - Pri la kunveno de Sudokcident-Germana Esperanto-Ligo, okazinta la 11-an kaj 12-an de sept. en naturamika domo Kohlhof, raportis la regiona programo de la Germana Televido, 1-a Programo, lunde la 13-an de septembro. La kunvenon patroprenis ĉ. 40 personoj. Al la kunveno direktis salutojn la Esperanto-Redakcio de Pola Radio kadre de la dimanĉa Esperanto-Ekspreso, je la 12-a de septembro.

## Esperanto-aranĝoj en oktobro

1. - 3.10. Kunveno de naturamikaj esperantistoj (TANEF)  
2.10. Cefkunveno de Rhein-Main-Ligo Esperantista  
Ambaŭ aranĝoj okazas en la naturamika domo "Am Mainzer Berg", 6110 Dieburg.
9. - 10.10. Trilanda renkontiĝo de la esperantistoj el la limregionoj de Belgio, Nederlando kaj F R Germanio en la junulargastejo de la urbeto Nideggen apud Düren.
- 9.- 11.10. Ekspozicio, informkunveno, libroekspozicio en München, Ausstellungsraum Holzkirchner Bahnhof, Bayerstr. 14. (Ĉiutage de la 9 - 18 horo)
15. -17.10. 20-a jarkunveno de la Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) en Paderborn. (Mendu ĉambrojn ĉe S-ino R.T. Lawerino, Ludwigstr. 48, D-4790 Paderborn, tel. (05251) 26456)  
Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo en "Junkerwald"-Bildungsstätte, Blieskastel-Niederwürzbach.
23. -24.10. Aŭtuna konferenco de NOGELO kaj KELI en Westerland/Sylt Informojn donas s-ino Hella Lanka, César-Klein-Ring 14, 2000 Hamburg 60.

\*\*\*\*\*

## Esperanto en Radio

"El la ekskurso tra Pollando kun laŭreatoj de la Pola Radio salutas vin kore kaj ĉiujn legantojn de Pilo-Press - A. Pettyn. Kun ni estas unu esperantisto: Lajos Niederfriniger el Budapeŝto".

La supran saluton ni ricevis de Andreo Pettyn, redaktoro de Pola Radio.

Varsovio. La Esperanto-Redakcio ricevis ĉi-jare jam 4000 korespondaĵojn. La demando nun estas, ĉu alvenos ĝis la jarfino 6000 aŭ 7000 korespondaĵoj. Kompreneble tio dependas de la aŭskultantoj. Ĉiu poŝtkarto kaj letereto kontribuas al pli alta rezulto. - En leterkesto la redakcio konfesis, ke ĝis nun ili ne jam trovis definitivan formon de la leterkesto. Ŝajnas al mi, ke la leterkesto devas respeguli la internaciecon de la aŭskultantaro; ĝi devas paroligi multajn diversnaciajn aŭskultantojn. Sed la ĉiusemajna statistiko restu ne-malhavebla parto. - Lasttempe oni aŭdis pli ofte en la elsendoj la voĉon de Milada Ŝveto, redakcia sekretariino, kiu pretigas la ĉiusemajnan statistikon. Al ŝi estu dediĉitaj vortoj de danko pro la aktuala statistika laboro!

Svisa Kurtonda Servo. Ges-roj Gacond legis el la aŭtobiografio "Fredo" de Lanti. Por d-ro A. Baur prelegis lia edzino, Heidi Baur.

Pekino. La Esperanto-elsendoj de Pekino estis dediĉita al la mortinta prezidanto Mao Zedong.

Vieno. El la semajna komentario de Peter Dusek ni citas: "Samopiniante kun la cetera mondo, la aŭstra kanceliero d-ro Bruno Kreisky valor-taksis la mortintan Mao Tse-tung kiel unu al la superregaj personecoj sur la politika scenejo de la dudeka jarcento.....La nova ministro por prieksterlanda politiko, Willibald Pahr, transprenis sian oficon en situacio, iom malfacila pro la miskompreno inter Jugoslavio kaj Aŭstrio rilate al la speciala kapnombro en la lingve miksitaj regionoj de Sudkarintio. Ni esperu, ke venkos ambaŭflanke la racio - kaj ke toleremo prenu la lokon de suspekto kaj rigoroĝoj."  
La 30-an de septembro, je la 18,40 horo sur beza ondo 203 metroj (regiona programo!) estos disaŭdigita la dua parto de recenzo germanlingva pri la libro "Mein geliebtes Esperanto". La stacio estas bone aŭdebla en Nürnberg.